# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 28. Majo 15, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Pezo: Teksto: 227 KB, PDF: AMO 101 en Latvio: 757 KB. Sume: 985 KB**

## AMO 101 en preparo en Latvio

Tio okazos en la apudmara urbo Ventspils en julio.La temo estas ‘Pli dinamika medio por baltaj esperantistoj’. Ni aldonas la preparitan priteman programon, en sveltigita PDF. Kvankam la konsiloj estas verkitaj por Baltio, ili validas ankaŭ por aliaj mondpartoj.

## Togolando kaj APETO, ja kun apetitoj

Membroj de Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO) kunvenis en la universitata centro Sankta Johano de Lomeo, 4 viroj kaj 3 virinoj ĉeestis. Krom ekzerca komparo de Esperanto kun evegbe (lingvo parolata ĉefe en la sudo de Togolando), kreo de leciono en evegbe, kies dua filmeto baldaŭ alireblos en la reto, traktiĝis la ideo de ĉeesta lingva kurso planita por okazi en la ĵus pasinta semajno en la publika universitato de Lomeo por komencantoj, kiuj sekvas enretan kurson en vatsapa grupo "Esperanto pour débutants". Tiu ĉi ĉeesta kurso nepre okazos ĉi-jare en plena semajno de unu el la venontaj monatoj, sub la gvido de Adjévi Adjé kun helpo de lokaj fortoj.

Dume, daŭros la instrua agado en la vatsapa grupo, en kiu membras 22 personoj. La plimulto de tiuj ĉi havas universitatan eduknivelon. Kelkaj el ili (progresemuloj) petis membrecon al UEA por la kuranta jaro. Kiel tradicie, dum la renkonto oni lernis, praktikis parole la lingvon, pripensis, planis kaj ankaŭ kunmanĝetis tion, kion ĉiuj povis kunporti al la kunveno.

Adjévi Adjé

## Slovenoj en la eŭropa debato

Slovenia Esperanto-Ligo (SIEL) proponas enkadre de la venonta »Nacia programo de edukado kaj instruado 2023-2033« inkludi kiel bazan kaj devigan programon por

instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj programon MLA (akcelilo por multlingveco, angle multilingual accelerator). Pli detale oni povas legi, elŝuti kaj uzi MLA en la retejo lernu.net (https://lernu.net/instruado). Ni menciu, ke la propono pri MLA estis la plej ŝatata propono enkadre de la Konferenco pri la estonto de Eŭropo, do ni certas ke multaj eŭropaj landoj sentas samajn problemojn rilate al la instruado de fremdaj lingvoj.

## Kleriga Lundo bezonas kontribuaĵojn

Aldone al la Internacia Kongresa Universitato kaj Scienca Kafejo, eblas proponi kontribuojn ankaŭ por la **Kleriga Lundo** (okazonta la 1-an de aŭgusto 2023).
La Kleriga Lundo celas ne nur informi al kongresanoj pri diversaj temoj, sed ankaŭ doni al ili okazon praktiki kaj vivsperti pri traktataj temoj. Pro tio la programo kutime ligiĝas al atelieroj kaj metiejoj. La diversajn aktivecojn, kiuj konsistigas la Kleriga Lundon, povas gvidi ĉiuj homoj el la Esperanto-komunumo pretaj dividi spertojn kaj sciojn, tiel ke speciala celo de tiu programero ankaŭ estas krei ligon inter esperantistoj per sciodivido kaj kunvivado. Se vi interesiĝas kaj volas ion proponi, skribu al la Estraro de UEA, per gk@co. uea.org, ĝis la **15-a de majo 2023**.

Por impresiĝi de la temoj kaj nivelo de la Kleriga Lundo eblas vidi ĝian programon dum la UK 2022 Montrealo en la pasintjara Kongresa Libro (p.42) kaj en la retejo de UEA:

https://uea.org/kongresoj/2022/programo?varianto=taga&ptrovo=Kleriga+Lundo

Por aliĝi al la 108-a UK uzu la retan aliĝilon: https://uk.esperanto.net/2023/. Jam aliĝis preskaŭ 1008 homoj el 58 landoj! Plej forta estas Francio kun 166 aliĝintoj.Ni rekomendas al kongresaliĝintoj aliĝi al grupo de UK en Telegramo: https://uk.telegramo.org/. Ĝis la revido en Torino!

Gazetata Komuniko de UEA kanj Komunikoj de Ondo.

## Subtenoj por Esperanto de renomaj homoj

Jen subtenoj al Esperanto de kelkaj gravuloj:

bit.ly/Vigdis-Finnbogadottir-Esperanto (Islando)

http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Rita-Izsak-UN-independent-expert-on-minority-issues.html

http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Dr-Tove-Skutnabb-Kangas-125-years-of-Esperanto.html

http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Dr-Robert-Phillipson-Professor-emeritus-125-years-of-Esperanto.html

http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Gerhard-Walter-Buergermeister-Stadt-Herzberg-am-Harz-urbestro-Herzberg-Esperanto-urbo-125-Jahre-gerechte-Kommunikation-zwischen-den-Voelkern.html

http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Fernand-de-Varennes-International-Observatory-on-Language-Rights-Universite-de-Moncton-Canada-125-years-of-Esperanto.html

-- Renato Corsetti:: Estus bone plue plurlingvigi tiujn mesaĝojn de gravaj personoj - kaj aldoni pliajn!

# La valoro de ĝentileco

Ĵus aperis en reta formo la libro pri lingva ĝentileco, redaktita de mi en la serio de la Etnolingvistika Instituto de AMU *Cross-linguistic and Cross-cultural Studies* kie troviĝas mia anglalingva artikolo pri la *Internacia ĝentileco uzante Esperanton*: https://wydawnictworys.com/grzecznosc-w-roznych-jezykach-i-kulturach-politeness-in-different-languages-and-cultures-red-ilona-koutny-agata-wolarska-sobocinska.html

Ankoraŭfoje dankon al tiuj, kiuj kontribuis al la enketo.

**PS:** Venis informo el Kubo, ke la artikolo estis raportita en Radio Havano kaj en retejoj en Kubo.

Prof. dr hab. Ilona Koutny

# Malagasa kulturo per la regula komunikado

Nia ELSENDO N°130 proponas al vi en sia rubriko pri la malagasa kulturo la unuan parton de la artikolo pri la malhelpoj kaj malpermesoj rilate geedziĝon. Krom tio, Henriel deklamos al vi unu el siaj poemoj el sia poemlibro DUON-ete. Ni cetere ilustras nian podkaston per la kanto de la bando ĴeLe kunlabore kun Vinilkosmo. Kiel kutime, ni ne forgesis prezenti al vi kelkajn novaĵojn de Malagasio dum la kuranta monato. https://youtu.be/B2P6yMpu3Zs

# Hispanaj informoj el la Bitbulteno 87




### LIBRO DE DELIBES TRADUKITA AL ESPERANTO

Aperis la traduko al Esperanto de unu el la ĉefaj romanoj de la kastilia verkisto Miguel Delibes. La romano titoliĝas *Sinjorino en ruĝo sur griza fono* kaj ĝi estas unu el la plej personaj verkoj de Delibes. Ĝi estis tradukita de la konata aŭtoro kaj tradukisto Antonio Valén, kaj eldonita de Mondial, kunlabore kun la zaragoza Fondaĵo Esperanto. Ĝi estas la unua tradukita al Esperanto verko de Miguel Delibes (1920-2010), eble la plej populara verkisto en Kastilio en la mezo de la 20a jarcento. La libron oni povas akiri en la libroservo de Hispana Esperanto-Federacio, ĉe UEA kaj en aliaj retaj vendejoj.




### LIBRO-TAGO KONIGAS NIAN LINGVON

En Madrido, Esperanto denove partoprenis en la sinsekva legado de la verko *Don Quijote*, organizita de la kulturinstitucio Círculo de

Bellas Artes. Vi povas spekti tie ĉi kaj tie ĉi. la laŭtlegadon.

Kataluna Esperanto-Federacio denove starigis budojn en la Tago de la Libro en Barcelono kaj Sabadell. En ambaŭ budoj, la asocio disvendis la plej freŝajn eldonaĵojn kaj ankaŭ aliajn elektitajn librojn, krom diversajn aliajn objektojn, kaj profitis la okazon por informi pri Esperanto kaj pri venontaj kursoj.

Bildo en la antaŭa paĝo.: La festado pro la libro Delibes.

# Plia kurso en Hispanio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: IES Marqués de Comares
Gvidantonomo: Juan Diego Díaz Bautista
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko:: Lucena, Hispanio
Aldoninto: juandiegoazbau

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27529

# Artikoletoj de 'facila org'

https://uea.facila.org/artikoloj/literaturo/infana-rememoro-r362/

https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/la-pordo-de-la-infero-r363/

Jen praktika servo de UEA, sub la prizorgo de Anna Lowenstein

# Argentina kurso

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo

Nomo: BAZA KURSO DE ESPERANTO
Gvidanto nomo: Ruben Sanchez
Tipo: Nova movada kurso
Loko Neŭken, Argentino

Aldoninto: rubensanchez

========= vortoj: 920 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.ĉe:
https://www.ilei.info/agado/EKO.php por 2023 (ĝis 20.).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.